
# *Elektita Kubo al la ekzekutiva komitato de la Organizo pri Sano Tutamerika (OPS)*




Havano, sep 30 (RHK) La kuba prezidento, Miguel Díaz-Canel elstarigis la elekton de la insulo por la ekzekutiva komitato de la tutamerika organizo pri sano (OPS)  por mandato trijare kune kun Brazilo kaj Surinamo.

En Tvitero, la prezidento parolis pri la fondusoj donitaj de Usono por malpresti?igi la kunlaboron medicinan de Kubo, kio estis denuncita enta? tiu institucio flanke de la kubaj reprezentantoj.

Anta?e, dum la ferma sesio de la 58-a estrara konsilantaro de la tutamerika organizo, Kubo estis elektita kun la subtenode ?iuj membro?tatoj, escepte de Usono.

Usono klopodis opozicii al la kandidati?o de Kubo kaj kalumniadis la kunlaborajn programojn pri sano, kio estis firme respondita de la kubaj reprezentantoj.

"La ekzemplo de niaj kuracistoj venkas la mensogojn kaj hipokritecon imperian", skribis la kuba ?tatestro en Tvitero.
Defendante la rajton de Kubo membri en la ekzekutiva komitato, la vicministrino pri sano, Marcia Cobas, taksis malrespekta kaj senmorala la klopodojn ligi la homan traktadon al la kuracista laboro de la kuba brigadoj internaciaj, kun la celo senpresti?i?i ilin.

La? esprimis la funkciulino, la sanitara personaro “laboras volonte kaj ?enerale en lokoj, kie neniu alia servo pri sano iras”.

La kuba kunlaboro ricevis en tiu ?i periodo la rekonon en diversaj mondopartoj, inkluzive de la Monda Organizo pri Sano kaj UN, memorigis la kuba reprezentantino

Fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/index.php/eo/noticias/nacionales/235465-elektita-kubo-al-la-ekzekutiva-komitato-de-la-organizo-pri-sano-tutamerika-ops

Radio Habana Cuba